

V-19579 / 1963r.

# ESPERANTA FINNLANDO

1963

N:o 8

## INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

**JARKOLEKTO** 1964 — 9 numeroj  
A bonprezo enlanda 4:— nmk  
eksterlanda 4:50 nmk  
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto  
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrero (abonoj kaj  
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,  
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Emil Sten-  
holm, Simo Raumavirta.

Redaktejo: Esperantotie 4, IIRIS-  
LAHTI (artikoloj, novaĵoj, recenzoj,  
interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj  
societoj estas varme petataj konstante  
kontribui per novaĵoj kaj interesaj  
artikoloj, proponoj ktp., por ke nia  
gazeto estu vera komuna informilo.

## KOULUMIEHEN SANA

28.—29. 3. 1961 allekirjoittanut tarkasti kielten opetusta Someron yhteiskoulussa. Koululle 22. 7. 1959 hyväksytyn lukusuunnitelman mukaan luetaan IC luokalla esperantoa 6 vkt. ja seuraavina kahtena lukuvuonna saadaan jotakin oppiainetta tällä luokalla opettaa esperantoksi. Tämän mukaisesti opetettiin nyt IIC ja IIIC luokilla maantietoa esperantoksi. Opettajana on unkarilainen Istvan Morocs. Niillä luokilla, joilla I luokalla on esperantoa, saksa alkaa II ja ruotsi III luokalta. Seurasin IIIC luokan ruotsin tunnin... ja saman luokan saksan tunnin... Lisäksi seurasin IC luokan esperantotunnin. Tarkastin IC luokan esperantovihot.

IC luokan esperantotunnilla kävi selville oppilaiden halu ja rohkeus kielen käyttelyyn. Heidät oli totutettu siihen, että he saivat vastata myös kuorossa. Oppilaat tekivät myös useita kysymyksiä opettajalle. He vaikuttivat kiinnostuneilta ja yritteliäil-

tä. Tunnilla ei lainkaan puhuttu suomea, mutta kuitenkin näytti suurin osa oppilaista hyvin pysyvän mukana. Tätä auttoi myös onnistunut tehtävä, eläinsatu, jossa opittavat sanat toistuivat luonnostaan moneen kertaan. Parhaat oppilaat pystyivät tunnin lopulla kertomaan koko faabelin yhteen jaksoon verraten sujuvasti.

Näytti siltä, ja samaa vakuuttivat kielten opettajat, että esperanton opettaminen vaikuttaa edullisesti muiden kielten oppimismahdollisuuksiin. Kun esperantossa edistymisen nopeaa ja oppilaat siten saavat tuntea osaavansa sitä, se edistää positiivista asennoitumista toisiinkin kieliin ja rohkaisee suurempaan yritteliäisyyteen. IIIC luokka oli siten edistynyt verraten hyvää vauhtia saksassa ja ruotsissakin, eikä saksan osalta ollut vallan paljon jäljessä IIIB luokkaa, joka oli alkanut opintonsa (vuotta) aikaisemmin.

29. 3. 1961

Kouluneuvos Olli Sampola

# UEA

Universala Esperanto-Asocio on ainoa kansainvälinen järjestö, jonka yksinomaisena tehtävänä on kansainvälisen kielen asian eteenpäinvieminen. Sen voimasta riippuu miten asiamme edistyy ja miten pian se toteutuu. UEA:n voiman perustana taasen on asiaamme vakavasti uskovan tuki, eli jäsenyys tässä maailman järjestössä.

Vuonna 1964 ovat jäsenmaksut: MJ eli vuosikirjajäsenyys 9.30 mk, MA eli tilaajajäsenyys 18.60 mk ja MS eli kannattajajäsenyys 27.90 mk. Ainaisjäsenyys on 372 mk, kuitenkin vasta ensi vuonna; tämän vuoden loppuun on se vain 292 mk; ks. tästä lähemmin ESPERANTO-lehden lokakuun numerosta siv. 178. — Alle 21-vuotiaat maksavat: MJ 4.65 mk ja MA 15.95. Viimemainittu saa vielä lisäksi uuden nuorisolehden KON-TAKTO. — Jos hankit uusia jäseniä, saat itsellesi pitää jokaisen uuden jäsenen jäsenmaksusta 10 %. Huom! myös aviopuoliso liittyköön jäseneksi.

Ensi kesän ulkomaanmatka suunnataan tietenkin 49. Kansainväliseen Esperantokongressiin, Haagiin Hollannissa 1.—8. elokuuta. Liittymismaksu on vuoden 1963 loppuun mennessä UEA:n jäseniltä 36.80 mk, puo-

lisolta puolet. Uudesta vuodesta maksetut kallistuvat. Pyytäkää minulta kongressin Bulteno N:o 1 liittymislomakkeineen. — Olisitteko valmis liittymään järjestämäni karavaaniin? — Kongressin kauniita kirje-merkkejä saa minulta: 25 kpl markalla ja 6 mk:lla 200 kpl.

Myös edustan seuraavia: »Internacia Scienca Asocio Esperantista» (= ISAE): jäsenyys + aikakauskirja Scienca Revuo 8.75 mk. Scienca Revuo harrastajille vuodelta 7.50 mk. Kaikkia Kööpenhaminan kongressin osanottajia varmaan kiinnostaa vuoden 1963 vuosikerta, koska se sisältää kaikki kongressissa pidetyt esitelmät ja maksaa siis 7.50 mk.

Universala Ligo: jäsenmaksu + La Praktiko 1964 8.25 mk.

Norda Prismo, erinomainen kirjallisuuslehti, v. 1964 8.25 mk.

El Popola Ĉinio: 1964 1.50 mk, 1964—65 2.30 mk tai 1964—66 vain 3 mk. (Jokainen joka hankkii tälle upealle lehdelle kaksikin uutta tilaajaa, saa lahjaksi silkkisen taideteoksen.)

Kaikki maksut minulle on suoritettava postisiirtotililleni: Tu 60 253.

Samideane via

Joel Vilkki, ĉefdelegito  
Somero.

## KELKAJ TERMINOJ POR FOTOGRAFIO

En 1906 aperis foto-terminaro kiel libreto »Elementa fotografa optiko» de Karlo-Verks. Ĉar tiu ne estas aĉetebla mi donas kelkajn terminojn, kiujn pridemandis leganto de EF, kun finna traduko.

fokuso polttio, polttopiste  
fokusa distanco polttoväli  
objekta distanco esineväli  
bildada distanco kuvaväli  
kunfokuso (yhteenkuuluvat) esine- ja kuvapiste  
kunfokusaj distancoj esine- ja kuvaväli

diafragmo himmennin  
malfermo (apertura) aukko  
neteco terävyys  
kampa angulo kuvakulma  
enfokusigi tarkentaa  
dikeco de fokuso aŭ neteca intervalo (kuvanpuolinen) terävyys  
profundeco de kampo (esineenpuolinen) terävyysalue. (Oikeastaan n. intervalo = terävyysalue, dikeco d.f. aŭ profundeco d.k. = syvätarkkuus = terävyysalueen laajuus)  
inversa filmo kääntöfilmi  
Ĝis alia fojo!

VS

## LA GRUPVOJAĜO AL TOKIO EN 1965.

En la venonta jaro 1964 vi kompreneble partoprenos la Universalan Kongreson de Esperanto en Hago. Informoj ekzistas en la gazetaro.

Sed **jam nun** estas aktuala: pensi pri la vojaĝo al la kongreso en Tokio en 1965 (31/7—7/8) kaj tuj fari ŝparplanon — vere bone motivita ago.

Oni planas aranĝi la veturon pere de luita aeroplano laŭ tipo SAS DC 8 Jet, kiu pasos la distancon Kopenhago — Anchorage — Tokio super la norda poluso en ĉ. 18 horoj. Supozebla forveturo de Kopenhago la 27-an de julio kaj reveno la 20-an aŭ la 21-an de aŭgusto. Eventuale dumvojaĝa surteriĝo povas okazi en Stockholm je kaj for- kaj reveturo.

La sveda vojaĝentrepreno RESO interkonsente kun UEA faris planon por skandinavia grupvojaĝo ril. al Danujo, Finnlando, Norvegujo kaj Svedujo. Surbaze de tiuj deziroj, kiuj aperis, oni opiniis, ke estas konvene doni kiel eble plej multe de la tempo je dispono de la partoprenontoj por ke ili kune kun japanoj kaj esperantistoj el aliaj landoj povu partopreni postkongresajn vojaĝojn kaj ekkoni Japanujon.

**Provizore** oni por la tempo 27/7—8/8 taksis koston de sved.kr. 3.800:— por partopreno de Kopenhago.

Por la tempo 9/8 — ĝis la fino de la restado oni devas kalkuli pri **aŭ** kostoj por iu postkongresa vojaĝo **kaj/aŭ** plilongigita restado en Tokio aŭ alia urbo. RESO tiurilate estos je via dispono por mendo de hotelĉambro ĝustatempe. La programo de la Kongreso laŭkutime aperos iom post iom, kaj tiam oni informos ankaŭ pri la vojaĝoj kongresaj en Japanujo.

En la nomita provizora prezo (3.800 sved.kr.) por la tempo 27/7—8/8 estas enkalkulitaj flugveturo tien-reen, servado en la aeroplano laŭ unuaklasa menuo, tranoktadoj kun matenmaĝo dum tiu tempo, kiam la Kongreso okazos, kelkaj informaj rondveturoj

kaj helpo de sperta gvidanto, kiu konas la cirkonstancojn en la Fora Oriento. Personaj servoj kaj manĝaj trinkaĵoj kiel ordinare ne estas enkalkulitaj. La loĝigado okazos en bonaj hoteloj. Unulitaj ĉambroj laŭ eblecoj kaj kroma pago.

La jaro 1965 estas malproksima, kaj montriĝis malfacile ricevi definitivajn informojn pri la flugkostoj. La prezo de la vojaĝo pro tio estas bazita sur la hodiaŭaj flugkostoj kun eta marĝeno por eventualaj pligrandigoj de la kostoj. Se ŝanĝo en iun direkton okazos, oni kompreneble konsideros tion kun sekvanta ĝustigo. Same oni povas ŝanĝi la tagojn de la grupvojaĝo kaj adapti la tuton al la definitivaj datoj, kiuj validos por la diversaj labordetaloj de la Kongreso kaj por la postkongresaj vojaĝoj, kiuj okazos tuj post la UK.

Tiuj, kiuj havas intereson pri la grupvojaĝo, devas **jam nun** anonci tion por ke ni ricevu ideon pri la aliĝo al la plej longa kongresvojaĝo, kiun ĝis nun aranĝis la skandinaviaj E-organizaĵoj. Provizora aliĝo devas okazi kiel eble plej baldaŭ, kaj ĝin vi sendu al **RESO, Specialreseavdelningen, Fack, Stockholm 1, Svedujo**. La aliĝon vi povas fari sur simpla karto aŭ per letero, post kiam RESO sendos ĉiujn informojn pri la vojaĝo kaj materialon por regula ŝparado kun la veturo al Japanujo kiel fina celo.

Estas jam konate, ke la unua periodo por la aliĝo al la **kongreso** (ne la vojaĝo) en Tokio ampleksas la tutan jaron 1963. UEA havas aliĝilojn.

Tokio estas la centra punkto de unu el la plej sorĉantaj landoj de la Oriento kaj krome la plej granda urbo de la mondo kun loĝantaro de pli ol 10 milionoj. En Japanujo la tradicioj, moroj kaj kolorriĉa vivo estas konservitaj, kaj hodiaŭ oni aĉceptas fremdulon pere de bonveniganta gastamo kaj malavara afableco, Vizito tie fariĝos neforgesebla memoro.





## SUOMEN ESPERANTO-OPISTON TUTKINTOVAATIMUKSET

Sen johdosta, että esperanton opetus kouluissa odotettavasti tulee lisääntymään, olemme uudistaneet tutkintovaatimuksemme niiden näkökohtien pohjalla, mitkä ovat tulleet ilmi Kouluhallituksessa käymissämme epävirallisissa neuvotteluissa.

Tällä kertaa julkaisemme **perustutkinnon vaatimukset**.

Tutkittavan on osoitettava, että hän tulee toimeen esperantoksi jokapäiväisen elämän tilanteissa, sekä suullisesti että kirjallisesti.

1. **Ä ä n t ä m i n e n.** On osattava erottaa toisistaan soinnilliset (g, b, d, z, v) ja soinnittomat (k, p, t, s, f) kerakkeet sekä erittäin suhuäänteet (s, c, ŝ, ĉ ja z, ĵ, ĝ), sekä painottaa viimeistä edelliset tavut.

2. **Kielioppi.** On tunnettava päätteet ja johtimet ja osattava käyttää niitä yksinkertaisissa lauseissa.

3. **S a n a v a r a s t o.** On tunnettava 500 tavallisinta vartalosanaa merkityksineen.

### Opiskeluvälineet

Ääntämisen opiskeluun, mikäli siihen ei saa henkilökohtaista opastusta, suositellaan ääninauhaa («Yleinen ääntämisohje»). Puhetaidon saavuttamiseksi on osallistuminen kurssiin tai kerhoon suositeltava.

Alkeisoppikirjana joko »Valtatie kielitaitoon» tai »Esperantokurso»; toinen näistä luettava harjoituskirjana.

Lukukirjoina ainakin kaksi seuraavista tai jotakin vastaavaa:

Mary kaj Sulo

Taglibro de Kongresano

Privat: Karlo

Baghy: La verda koro

Kielioppina »Lyhyt esperanton kielioppi» tai kirjekurssin kielioppi.

Sanavaraston voi oppia »Maailman kirjeenvaihdon oppaan» sanaluettelosta, tai ainakin sen avulla tarkistaa osaavansa vaaditut sanat. Opiskelutyön ohessa voi käyttää joko Esperanto-avainta ja Vasta-avainta tai J. Vilkin Suomi-Esperanto-Suomi sanakirjaa.

### Tutkinnon toimeenpano

Tutkintoon ilmoittautuja saa henkilötiedustelu-lomakkeen, joka on täytettävä ennen tutkintoa.

Tutkintoon sisältyy 1) sanastotesti, 2) täydennystehtävä, 3) käännoستهتävä, 4) suullinen kuulustelu.

Tutkittavalta, joka on ennen tutkintoa suorittanut kirjekurssin ja saanut siitä todistuksen, voidaan tutkinnon kirjallisia tehtäviä huomattavasti supistaa, varsinkin, jos kirjekurssin todistuksesta on hyvä arvosana.

Tutkintolukuja suunnittelevalle suositellaan »Valtatiehen» perustuvaa kirjekurssia, joka antaa lujan pohjan ylemmän asteen tutkintoonkin valmistumiseen.

---

## LA ĈEFURBESTRO DE KOLONJO FARIS ESPRANTLIGNVAN PAROLADON

Kolonjo. Okaze de la akcepto de eksterlandaj ekspozicianoj ĉe la internacia ANUGA-foiro fare de la urbo Kolonjo la ĉefurbestro de Kolonjo, s-ro Burauen, alparolis la gastojn per jenaj vortoj en Esperanto:

»La ANUGA estas la prototipo de internacia ekspozicio. Pro tio, dum akcepto de eksterlandanoj, mi ĉiam sentas min en embaraso, en kiu lingvo mi direktu miajn salutvortojn al vi, sen bezono de interpretisto kaj sen la neceso, neglekti iun landon kaj ties lingvon. Tial mi uzas la popoligantan Esperanton, por alvoki al vi ĉiuj, speciale al la gastoj el la eksterlando, »Koran Bonvenon!»

Ĉefurbestro Burauen ne estas esperantisto, li petis la tradukon de sia parolado de s-ro Berger, la iama redaktoro de Germana Esperanto-Revuo.

# KAUAN KAIVATTU OPISKELUVÄLINE

## ON NYT VALMIS

### UUSI, MODERNI KIRJEKURSSI VALTATIEN POHJALLA

Laajempi ja perusteellisempi kirjekurssi »Koresponde laŭ PRIVILEGIA VOJO» on suositeltava tehokkaaseen opiskeluun. Kurssi perustuu seuraaviin kirjoihin, joista sanakirjat ovat vaihtoehtoiset (varsinainen sanakirja suositeltavampi):

	Vaihtoehdot	
	1	2
Oppikirja:		
Valtatie kielitaitoon	3,80	3,80
Sanakirja:		
Suomi-Esp.-Suomi		4,50
Esp.-avain ja vasta-avain	1,—	
Kielioppi:		
Lyhyt Esper. kielioppi	—,65	—,65
Opetuskirjeet	4,—	4,—
Tilattaessa:		
maksettava kirjoista	9,45	12,95
ja postikuluja	—,55	—,55
	Yhteensä	10,— 13,50

Kurssiin kuuluu 15 opintokirjettä, joista 13:ssa annetaan tehtäviä ja kahdessa viimeisessä tutkintotehtävät. Ensinmainittujen korjaamisesta sekä tutkintotehtävistä on maksettava kustakin 2,50 mk, siis yhteensä 14

Suomen Esperanto-opisto  
Esperantotie 4  
IIRISLAHTI  
postisiirto 6564

eränä à 2,50 eli siis yhteensä 35 mk. Jos haluaa suorittaa korjausmaksut kerta kaikkiaan ilmoittautuessa, on tämä maksu vain 30 mk. Oppikirjoja ei tietenkään ole pakko lunastaa kurssin yhteydessä, jos jo omistaisi sellaiset taikka haluaisi ne hankkia muuta kautta.

Kun tutkintotehtävät on suoritettu, annetaan opiskelijalle todistus kurssin suorittamisesta.

Ääntämisohjeena suosittelemme »Yleistä ääntämisohjetta», joka on saatavana ääninauhana (myöhemmin kenties myös äänilevynä), hintaan 4 mk + postikulut (pikkupakettina —,75).

Kurssin suorittanut kykenee hyvin ryhtymään kirjeenvaihtoon ulkomaalaisten kanssa sekä lukemaan esperantokirjallisuutta melkein ilman sanakirjan apua. Puhetottumuksen saamiseksi kehoitamme liittymään johonkin esperantokerhoon.

Lisätietoja annamme kernaasti. Kyselyyn liitettävä vastauspostimerkki.

Esperanto-palvelu ja kirjamyynti  
Pajupillintie 26 A  
ETELÄ-KAARELA  
postisiirto 6806

### LA 1A ESPERANTO-GRUPO FESTOS SIAN 74JARAN JUBILEON.

Nurenbergo. En la kadro de la tradicia Zamenhof-Festo la 1a Esperanto-Grupo de la mondo, Esperanto-Gruppe Nürnberg, la 13an de decembro 1963 festos sian 75jaran jubileon de sia ekzistado en la impona salono de trafikmuzeo Nürnberg kune kun la esperantistaj fervojistoj, grupo Nürnberg. La Esperanto-Grupo Nürnberg fondiĝis en la jaro 1888 kaj unu jaron pli poste eliris ĉi tie la unua Esperanto-jurnalo »La Esperantisto». Dum sia 75jara historio ĝi ĉiam ludis pli aŭ malpli gravan rolon en la Esperanto-movado. Nuntempe

Nürnberg fariĝis centro de la germana Esperanto-movado. Ekde la 1a de julio 1963 Nürnberg estas la sidejo la Centra Officejo de Germana Esperanto-Asocio sub la gvidado de s-ano Ludwig Pickel, Sekretario de GEA kaj prezidanto de la Loka Grupo. En la sama urbo ankaŭ aperas la trian jaron la germanlingva Esperanto-informilo presita »DER TRICHTER — LA FUNELO». Ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo estas petataj sendi gratulojn al Esperanto-Gruppe 85 Nürnberg 2, Postfach 2113, Gremanujo.

# KONTAKTO, NOVA GAZETO

Ĝis nun mankis internacia junulara revuo tute en Esperanto. Do, T.E.J.O., kiel unu el siaj kontribuajoj al la Jaro de la Junularo en 1963, decidis ekeldoni specialan tian gazeton, kun la celo ne nur plibonigi kontaktojn inter siaj anoj sed ankaŭ kunligi la tutan Esperanto-movadon pere de nova, juneca idealo.

T.E.J.O., la junulara sekcio de U.E.A., estas la ĉefa junulara organizo en la Esperanto-movado, kaj ĝi kunligas sur neŭtrala tereno naciajn junularajn asociojn kaj klubojn el ĉiuj mondpartoj.

T.E.J.O. faris dum la pasintaj kelkaj unu-du jaroj vere rimarkindan progreson. Ĉiam ĝi fariĝas pli kaj pli forta. Ĝi nun estas en pozicio finance garantii la regulan eldonadon de ĉi tiu ĝia nova gazeto. Subtenu la junularon kaj asekuru la estontecon!

Individuaj membroj de U.E.A. kiuj

ricevas la revuon »Esperanto» kaj havas malpli ol 25 jarojn ricevos la gazeton **Kontakto** senpage. Pro tio, aliĝu al U.E.A. kiel Juna Membro-Abonanto aŭ Membro kun Junulara Gazeto! Alikaze, oni povas aboni la gazeton laŭ kutima maniero plenigate abonilon kaj pagante la kotizon de 32 steloj.

**Kontakto** enhavas seriozajn artikolojn pri aferoj kiuj aparte interesas la junularon. Ĝi aperos kvarfoje jare. Abonu ĝin tuj ĉe la administrejo de Kontakto en Rotterdam, aŭ ĉe perantoj de U.E.A.! Ĝia regula apero estas rekte garantiita de T.E.J.O.!

---

## NENECESA

En iu vilaĝo oni kolektis monon por konstruigi ŝtonan muregon ĉirkaŭ la vilaĝa tombejo. Bienposedanto H., kiu estis vaste konata pro sia avareco, ne volis doni monon, kaj sian rifuzon li motivis jene:

Tia murego ja estas tute nenecesa! Unue, en la tombejo estas neniu, kiu povus forkuri de tie. Due, ekster ĝi ekzistas neniu, kiu volus tien!

---

**LEVITTÄKÄÄ ASIANTUNTEMUSTA!**

**FORIGU ANTAŬJUĜOJN!**

**DISDONU ĜUSTAJN INFORMOJN!**

**HAVU ĜOJAJN KLUBKUNVENOJN!**

Jen la iloj:

Tässä välineet:

Prezo afrankite:

Hinta postimaksuineen:

	kpl/ekz	1	10	100
Mitä merkitsee ETUOIKEUS, jonka jokainen voi saavuttaa?		—,25	1,—	5,—
ESPERANTO, mitä se on ja mitä se ei ole, radioesitelmä		—,25	1,30	11,—
LAULUVIHKO, 16 tuttua laulua esperantosanojn + nuotit		1,15	10,30	100,—

**ESPERANTO-LIBRARO**

Pajupillintie 26 A

ETELÄ-KAARELA (Helsinki)

Postisiirto 6806



# LINGVAJ RESPONDOJ

## Pri la uzado de formoj simplaj anstataŭ kunmetitaj.

La vorto »bezonesti« estas kunmetita tute regule, kaj vi povas ĝin uzadi. Sed entute ni konsilas pli uzadi formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj se ili estas ne kunligataj, sed uzataj aparte.

La Esperantisto, 1891

## Pri la sufikso »eg«

Tute prave vi diras, ke la sufikso »eg« ne povas servi por simpla anstataŭado de la vortoj »granda« aŭ »tre«, sed ĝi povas servi por kreado de vortoj **novaj** kun senco **speciala**. Tia neĝusta uzado de la sufikso certe ne estas aprobinda, kaj, kiom oni povas, oni devas ĝin eviti. Tamen esti **tro** severaj en tiu ĉi rilato ni ankaŭ ne devas. En multaj okazoj, en kiuj ni povus bone uzi vortojn »granda« aŭ »tre«, ni povas ankaŭ sen peko kontraŭ la spirito de Esperanto uzi la sufikson »eg«, ĉar tre ofte la saman ideon unu persono povas prezenti al si kiel ideon simplan en granda mezuro, dum alia persono ĝin prezentas al si kiel ideon **specialan**. Ekzemple, la vorton »bonega« ni preskaŭ ĉiam povus anstataŭigi per »tre bona«, kaj tamen en la samaj okazoj oni ankaŭ povas prezenti al si bonecon **eksterordinaran** kaj uzi por ĝi vorton **apartan** tiel same, kiel oni faras preskaŭ en ĉiuj lingvoj. Laŭ mia opinio ni devas esti tre singardaj nur en tiaj okazoj, en kiuj ni povus ricevi aŭ senduban, por niaj oreloj malagrablan, **eraron** kontraŭ la lingvo, aŭ tute malĝustan sencon; sed en ĉiuj aliaj okazoj tro granda severeco kaj katenado estas superflua. En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi?

La Revuo, 1908.

## Pri la prefikso »ge«

La prefikso »ge« rilatas ne sole al du personoj, sed ĝi povas rilati ankaŭ al **multaj** personoj; ĝi signifas simple »de ambaŭ seksoj«. Mi persone ĝis nun uzadis tiun ĉi prefikson ĉiam nur por esprimi **ambagseksan familian tutajon el personoj starantaj en la sama linio de parenceco**; tial mi diradis ekzemple »gepatroj«, »gemastroj«, »gefratoj«, »genepoj«, »gekuzoj«, »getajloroj« (en la senco de »tajloro kaj lia edzino«); sed mi neniam esprimis

ekzemple per »getajloroj« la tutan familion de tajloro, ĉar la gefiloj de tajloro ne staras en la sama linio de parenceco kun la tajloro, kaj mi ankaŭ evitados diri »gesinjoroj« pri personoj, kiuj ne apartenas al unu familio (mi nomadis ilin »sinjoroj kaj sinjorinoj«). Tamen mi konfesas, ke mi havis nenian kaŭzon, por uzadi la prefikson »ge« sole en la dirita maniero. Ĉar en la fundamenta (universalaj) vortaro de nia lingvo »ge« signifas simple »de ambaŭ seksoj«, kaj ĉar la uzado de la prefikso en tiu ĉi senco neniam donas malkomprenigon, tial ni povas tre bone uzi tiun ĉi prefikson en **ĉiuj** okazoj, kiam ni parolas pri ambaŭ seksoj. Sekve se al personaro, kiu konsistas el ambaŭ seksoj, iu sin turnas kun la vorto »gesinjoroj«, li faras nenian eraron, kaj eble mi mem ankaŭ de nun iafoje uzados la prefikson en tiu ĉi senco.

La Revuo, 1907.

## Pri la prefikso »re«

Tiu ĉi prefikso signifas **venon returne al la loko aŭ la stato, de kiu oni foriris**. Sekve:

1: Se A donis ion al B, kaj nun la objekto estas denove ĉe A, ni diras, ke B **redonis** ĝin; A **reprenis** ĝin; la objekto **revenis** al A. Tiel **spegulo rejetas la radiojn, kiuj falis sur ĝin. La pilko resaltas de la tero, k.t.p.** (Tie **re = returne**).

2: Se mi ion faris kaj poste denove faras tion saman, mi ankaŭ venas returne (en mia farado) al tiu punkto, de kiu mi foriris. Sekve **refari** t.e. fari denove, kion mi (aŭ alia persono) jam faris, **rekanti, rejuniĝi** k.t.p. (Tie ĉi **re = denove**).

## Pri la sufikso »ad«

Ĉie, kie la senco permesas, mi preferas formojn pli **mallongajn**; sekve mi dirus: »la 5 **sentoj** estas la aŭdo, gustumo...« k.t.p. (sen **ad**); sed pli bone estus: »La 5 **sentoj** (sen »ad«, ĉar kapabloj) estas la aŭdado, gustumado (kun »ad«, ĉar farado)«.

El »Originala Verkaro«.

## Pri la ordo en kunmetita vorto

»Falakvo« kaj »akvofalo« ambaŭ estas bonaj (falakvo signifas pli la falantan akvon mem, akvofalo signifas pli la lokon de falado).

El Originala Verkaro

**Al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu.**

**Al Dio servu, diablon rezervu.**

Kun sukceso okazis ĉe la bone konata internacia tendumejo en PRIMOSTEN la unua »Semajno» de Studenta Tutmonda Esperantista ligo, de la 14a ĝis 21a de aŭgusto 1963a. Pli ol kvindek gestudentoj eli tri kontinentoj aŭdis prelegojn de Romuald SKALINSKI (Pollando), Prezidanto de STELO, kaj Lars OLSSON (Svedlando) pri ĝisnuna kaj estonta agado de la Ligo, de Ivo OSIBOV pri la »Sistemo de studado en Jugoslavio» kaj de Mija ZUPANIC (el tiu sama lando) pri »Studentoj kaj internacia kunlaborado». Post ĉiu prelego ili vigle debatis. Krome ili ekskursis al Insulo de Amo kaj al la belegaj akvofaloj de KRKA, diversmaniere tre multe amuziĝis, banadis . . . kaj entute tre ĝojis ripozi en Esperantujo post la bulgaraj kongresoj. Ankaŭ kunvenis la nova Estaro de la Ligo, kiu prilaboris ĝian laborplanon por la studjaro 1963—1964. Menciinda estas inter la japanaj partoprenantoj la ĉeesto de la Prezidanto de Japania Esperantista Ligo Studenta.

STELO estas studenta sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj kunlaboranta faka asocia de UEA. Informojn petu de la Sekretario Carlo MINNAJA, ĉe Pasquini, Via Martiri 1 PISA, Italujo.

#### AVENUE DRO ZAMENHOF EN ANDERLECHT-BRUSELO 7

La Urbkonsilantaro de Anderlecht decidis, la 4an de novembro 60, laŭ propono de Samideano Jos. Bracops, urbestro kaj parlamentano, nomi novkreotan vojon, **Avenue Doktoro Zamenhof**.

Ĝi nun estas sufiĉe preta kaj estis inaŭgurata, sabaton, 15an de junio 63.

Solena ceremonio okazos en la urbo-domo kaj poste, grupe, oni marŝos ĝis la nova avenue kie la urbestro tranĉos la tradician kordonon.

Simpatiantoj danku kaj gratulu la urbestraron. Antaŭdankon.

SAT-Amikara Gdupo Bruselo,  
Sekretario: M. Van Aelst

#### SUKCESA KONGRESO DE GERMANAJ ESPERANTISTOJ FERVOJISTAJ.

Regensburg. Laŭ informo de la loka gazetaro 300 esperantistoj ĉeestis la festkunsidon de la 7a jarĉefkunveno de Germana Esperantista Fervojistaj Asocio (GEFA) en Regensburg. Tiu granda nombro de partoprenantoj, inter kiuj ankaŭ estis gastoj el kelkaj eŭropaj landoj, dokumentas la progresojn de Esperanto inter la germanaj fervojistoj. Ok kandidatoj sukcesis en la lingva ekzameno.

(Lau PILO-PRESS)

La Universala Kongreso okazos en 1965 en Tokio. Japanio estas ĉarma kaj al ni okcidentanoj iom mistera lando, kiun ni certe tre volonte vidus. Dum la lastaj tempoj japana melodio Sukiyaki estas tre favorata, ĝi ankaŭ plenigas nin kun miro. Kio estas tio sukijaki-o? Mi povas vin informi, ĝi estas bongusta manĝaĵo, kies recepton mi donas ĉi tie:

#### INGREDIENCOJ:

- 4 servkuleronj da sesama aŭ majza oleo
- 1 kilogramo de plej bona bova dor-saĵo.
- 1 decilitro da osta aŭ vianda supo (klara) aŭ sama kvanto da forta buljono.
- 1½ decilitroj da sojsaŭco.
- ½ decilitro da sukero
- 1 servekulero da ŝereo (aŭ seka madejra vino)
- 3 cepoj, maldike tranĉitaj
- 1 decilitro da celerio, en etaj tranĉaĵoj.
- ½ de konservujo de elkreskaĵoj de bambuo
- 2½ decilitroj da enpecigitaj ŝampinjonoj
- 1 decilitro da disŝirita spinaco
- 1 decilitro da dishakita ŝenoprazo aŭ folioj (verdaj) de cepo.
- ½ kilogramo da kuirita kaj drenita vermiĉelo.

La viando estas tranĉita en longajn »rimenojn», 1—2 cm dikajn kaj ĉ. 5 cm larĝajn. La oleo estas varmigita en larĝa fritilo ĝis kiam ĝi estas vere varmega. La viandostriojn oni metas en la kuirantan oleon, tiel ke ili fariĝas bele brunaj. La supo aŭ buljono estas miksitaj kune kun la sojsaŭco, ŝereo kaj sukero. Duono de tiu ĉi miksaĵo estas verŝata sur la viandon, reston oni ŝparu. Nun la viando estas ŝovata flanken en la fritilo. Sur modera varmego oni nun kuiras (en la oleo, en la sama fritilo!) la cepon kaj celerion ĉirkaŭ 3 minutojn. Nun oni verŝas la reston de buljon-miksaĵo kun la bambuo-burĝonoj, ŝampinjonoj kaj spinaco. Ree kuiru dum 3 minutoj. Miksu la ŝenoprazon kaj ree kuiru, nun nur unu minuton. Nun metu la kuiritan vermiĉelon (kiam vi kuiras ĝin, ne forgesu la salon!) sur unu flanko de telero, kaj la sukijakion sur alia, kaj tuj servu! Post la manĝo vi certe aliĝos al la karanvanvojaĝo al Tokio. Bonan apetiton!  
Seija Raumavirta